



Ĵaŭdon matene:
D-ro Amri WANDER
prelegas

Morgaŭ (ĵaŭdon), niaj klasoj finiĝos iom frue por ke ni havu tempon aŭskulti vizitanton al NASK. D-ro Amri WANDER estas fama Esperantisto, akademiano, aŭtoro kaj astrofizikisto de Israelo. Liaj esplor-interesoj inkluzivas alt-energian astrofizikon, galaksiajn nukleojn, nigrajn truojn, kaj planedojn ekster nia sunsistemo.

Klasoj morgaŭ matene finiĝos dum la kutima paŭzo. **Iru en AP&M (la konstruaĵo kie troviĝas la lingvo-laboratorio) al la ĉambro 4301.** Je la 11-a, d-ro WANDER prelegos pri la temo “Ĉu ni estas solaj? La serĉo de ekstertera vivo.”

Kial vivi... vegane?




Ĉu vi scias kiel savi pli ol 35 vivojn ĉiujare, sen iu ajn elspezo da tempo aŭ mono?
Venu al la komuna ĉambro je la 7-a por ekscii!
Hoss parolos pri veganismo kaj samtempe dikigos vin per ĉokolada glaciaĵo.

Pri la temo: kion signifas tiu stranga vorto *vegano*, kaj kial pli kaj pli da homoj nun elektas vivi vegane? Ĉu temas pri nova religio? Ĉu danĝera sekto de masohistoj kiu ĝuas senigan vivstilon? Ĉu veganoj estas eksterteranoj de sunsistemo ĉirkaŭ la stelo *Vego*...?

Efektive, temas pri tre simplaj kaj kompreneblaj principoj: kompato kaj malakcepto de senbezona krueleco.

Kio estas la ligo inter la idealoj de Esperanto kaj veganismo? Venu, formanĝu glaciaĵon, kaj eksciu!

Kalembura kadro



La lasta enigmo estis “**KUL-EROJ**”
La hodiaŭa estas: **P** _ _ _ _ _ **O**

El la kalendaro...

Bonvolu noti: niaj planoj ŝanĝiĝas ofte. Nur eventoj por *hodiaŭ* estas fiksitaj; la aliaj estas nur provizoraj. La plej freŝa informo haveblas ĉe <http://esperanto.org/nask/kalendaro>

	merkredo	ĵaŭdo	vendredo
matene	klasoj	9-10:20: klasoj 11-12:20: Amri WANDEL prelegas (AP&M 4301)	klasoj
post- tagmeze	3 ptm: David JORDAN prelegas (AP&M 4301)	<i>libera</i>	<i>libera</i>
vespere	7 ptm: Hoss parolas pri veganismo (komuna salono)	7 ptm: diplomceremonio (AP&M 4301)	<i>libera</i>

★ 3 ptm: David JORDAN prelegos

D-ro Jordan, kiu tiel afable gastigis nin pasintsemajne ĉe sia propra hejmo, venos por denove regali nin! Bonvolu noti ke la loko raportita en la hieraŭa kalendaro ne plu validas: **ni renkontiĝu en la 4-a etaĝo de AP&M.** La temo ankoraŭ ne estas firma, sed eble d-ro Jordan laŭtleĝos por ni de unu el siaj rakontoj.

★ 7 ptm: Hoss parolos

Iru al la komuna ĉambro je la 7-a por lerni pri veganismo. Hoss kunportos vanilan kaj ĉokoladan glaciaĵojn (veganajn, kompreneble). Venu kaj dikiĝu!

Solvoj de la hieraŭa krucvorteniĝo

Vertikalaj:

1. La *New York Times* estas unu el ili.
2. Verdul(in)o kiu parolas angle kun alia verdul(in)o, aŭ granda kvarpieda danĝera rampulo.
3. Malpeza ludilo aŭ nomo de Esperanta-muzika grupo.
4. Ili vivas malamike, kiel hundo kun...
5. Estonta viro.
6. Vegetaĵo kun pikiloj, tenantaj akvon en la karneca tigo.
9. Cirklaĵo por meti sur la kapon de iu.
10. La sango alfluas al la...

Horizontalaj

2. Tablon ornamas ne tuko sed...
4. Cirka amuzisto.
7. Maŝino por komputi.
8. Ano de iu el la prapopoloj de Ameriko antaŭ la europa enmigrado de la 16-a jarcento.
10. Besto kun unu aŭ du ĝiboj ĉe la dorso.
11. Paca birdo.
12. Skribilo uzata por fari hejmtaskojn.



Vertikalaj:

1. ĈAPELO
3. HUNDO
4. FLAGO
5. ĜIRAFO
6. ĈIELARKO
9. BOTO
10. CERVO

Horizontalaj:

2. ARANEO
7. FIŜO
8. ARBO
9. TELERO/KULERO
12. AKVOMELONO
13. FUTBALISTO
14. DOMO
15. GITARO

Dankon al Mar pro la krucvorteniĝo!